# POR LA PACO
## Kontraŭ la milito

(citaĵoj
el
eminentuloj)



Suplemento
de
La Juna Penso
F 47340 Laroque Timbaut
105 A 1975 3,50 FF

Tiun ĉi broŝuron esperantigis k eldonis SAT-pacistoj.

Por informoj pri la Pacista Frakcio de S.A.T.
(Sennacieca Asocio Tutmonda) sin turni al:

R. Schneller, 3 av.de Rosemont, CH 1208 Ĝenevo.

---

Gérant & imprimeur: C. Baudé, F 47340 Laroque Timbaut

# P O R
# L A
# P A C O,
# K O N T R A Ŭ
# L A
# M I L I T O
# . . .

(citaĵoj el eminentuloj)

ALAIN, franca filozofo:

Ĉe ĉiu militeca deklamo, silenti ; kaj se temas pri maljunulo , kiu ekscitiĝas , imagante la buĉadon de junuloj , malvarma malestimo . Ĉe milita ceremonio, foriri.

Karlo ALBERT:

Por liberiĝi el la servuto, ni devas do kalkuli nur pri ni mem, kaj por tio ni havas ununuran rimedon : rifuzi submetiĝi.

. . .

Tiom longe dum ni lasos nin konduki al la buĉejoj kiel obeemaj ŝafoj , ekzistos buĉejoj kaj buĉistoj por gajni monon aŭ gloron per nia vivo . Tiom longe dum ni akceptos loĝi en kazernoj , surporti la soldatajn livreon kaj armilojn , ekzistos armeoj kaj kazernoj.

. . .

Ni likvidos, tute likvidos la abomenan servuton, en kiu tenas nin la militismo,nur kiam ni estos decidintaj ekribeli,pretaj por rifuzi obei,kiam,anstataŭ forlasi niajn parencojn,niajn amikojn, nian laboron por iri plenumi en hontinda kazerno nian tempon de milita bagno, ni trankvile restos hejme.

Carl Jonas Love ALMQVIST:

Estas kaj restos terura afero, ke homo povas ricevi povon super alia homo kaj tiel akiri postenon , en kiu li povas la alian peli ĝis morto.

Emilo ARMAND:

La rifuzo militservi estas tute alia afero ol individua rimedo por mem elturniĝi,kiel oni iafoje supozis. Per ĝi asertiĝas la aŭtonomio de la homa persono, ekster ĉiu ajn afekta sentemo. Kiu rifuzas la militservon, tiu malagnoskas al la ŝtato la rajton disponi lian korpon kaj uzi ĝin por servo, kiun li juĝas ne- aŭ malutila.

Ivano AUDOUARD:

Oni scias kiel fabrikiĝas la atombombo.Oni ne scias kiel devigi la homojn kredi, ke tio estas bonfaro por la homaro.

Abato Andreo BACH,vikario de la Pariza Ekleziularo:

Kiujn rimedojn mi rekomendas por eviti ĉiodetruan militon?

1)agnoski, ke la milito inter ni, homoj, ĉiam estis faro de nia stulteco kaj de nia malboneco;
2)interkonsente plenumi nian universalan malarmiĝon;
3)honori kiel heroojn kaj pionirojn de pli homeca estonto la militrifuzantojn.

Miĥail Aleksandroviĉ BAKUNIN:

En politikaj aferoj decidas nur la sukceso pri tio, kio estas granda faro kaj kio estas krimo.

A.D. BANCEL:

La militismo brutigas la oficirojn kaj la soldatojn. Ĝi frakasas ilian individuecon, transformas ilin en aŭtomatojn kaj vekas ĉe la malkleruloj brutalecon kaj maltoleremon.

Profesoro L.BARBEDETTE:

Pri tio ke la reakciuloj kaj la naciistoj persekutas tiujn,kiuj rifuzas elverŝi homan sangon,neniu devas surpriziĝi.Ili ja troviĝas en sia rolo kaj obeas la monstrajn ordonojn de la dio, kiun ili adoras.

Johano S.BARES:

La militisto estas pigrulo, kiu vivas sen produkti, rabante al la laboruloj la frukton de ilia laboro. Do, Ciro, Aleksandro,Cezaro, Napoleono kaj Bismarko estis nur kapitanoj de ŝtelistoj.

Henriko BAUER:

Nia konscienco ne permesos,ke homo, eĉ se temas pri la estro de l'plimulto , ĝenu nian ripozon, konduku nin al la milito , al detruo de homoj, niaj samuloj, pro tio ke ili parolas alian lingvon kaj naskiĝis aliflanke de l'rivero aŭ de l'monto.

Walter BAUER (Poŝtkarto al junaj homoj):

Ne cedu, kiel ni faris,
ne sekvu la allogojn,
pripensu, rifuzu, malakceptu.
Pripensu antaŭ ol vi diras jes,
ne kredu tuj,
ankaŭ ne kredu la ŝajne klaran.

Aŭskultu bone, aŭskultu longe, atente,
ne kredu al la racio,
al kiu ni subigis nin.
Komencu per la muta ribelo
de la pripensado,
ekzamenu kaj malaprobu.
Nur malrapide formu la Jes de via vivo.
Ne vivu kiel ni.
Vivu sen timo.

Daniel BERRIGAN:

Kristano posedas la eblon rezisti la leĝon de la lando. Mi celas tiun leĝon, kiu protektas militpreparantojn kaj kiu persekutas pacistojn.

Kristanoj povas arigi sin en la najbareco,en la profesia laboro aŭ en la eklezia komunumo, tiel ke tiuj, kiuj organizas la murdadon, puŝas kontraŭ solidan muron de konscienco.

Rajmondo BERTHOLET:

La prokonscienca militrifuzado povas do fariĝi potenca forto je la servo de la strebantoj al reala demokratio, en kiu la homo ne plu estos lupo por sia samulo.

Johano Rikardo BLOCH:

En epoko de perforto kaj en socio bazita sur perforto, la plej kuraĝa ago ne plu estas la perforto, sed la rifuzo al perforto...

R. BODEAU:

Mi admiras la faron de tiu,kiu agordante siajn agojn kun sia konscienco,spontane rifuzas servi tion, kio morgaŭ kontribuos detrui la homaron.

Jako BOIS , profesoro pri filozofio:

La milito ekzistis antaŭ la konskripcio . Kontriĝas do,ke ne sufiĉas aboli la konskripcion por forigi la militon. Tamen, pro la fakta ligilo,kiu tiel forte stariĝas inter la milit-organizo kaj la konskripcio, oni povas aserti,ke la forigo de l'konskripcio komplete modifus la atmosferon kaj kontribuus,eble decidige, al la pacigo de l'spiritoj kaj al la starigo de vera ordo internacia.

Ivano BONDAROFF, eksredaktoro de Duĥobor:

Estas nur unu efika rimedo por sukcese lukti kontraŭ la militismo: senigi ĝin de ties rimedoj; detrui la armilojn, rifuzi la militservon kaj rifuzi kunhelpi en ĝia tuta preparado teknika kaj morala.

BOUCHER DE PERTHES:

Nur io farenda: interplekti la brakojn; kaj nek por oro,nek por arĝento,nek pro promeso,nek pro minacoj

tuŝi nek tiun pafilon nek tiun bajoneton...
Ĉe tiu rifuzo oni insulte nomos vin servrifuzinto, ribelulo,malkuraĝulo; tamen plue ne tuŝu la pafilon. Oni montros al vi la fremdulojn invadantajn la patrion;lasi la fremdulojn invadi la patrion. Oni montros al vi la eksterlandanojn renversantajn la tronon aŭ la prezidentan fotelon. Ĉio ĉi absolute ne koncernas vin.

BOUTHOUL: Soldato estas armita maldungito.

Bertolt BRECHT:

Konsekvencoj

La potenca Kartago faris tri militojn.
Post la unua ĝi estis ankoraŭ forta, post la dua ankoraŭ loĝebla, sed post la tria oni ne plu povis trovi ĝin.

A. BRIAND:

La kontraŭpacaj artikoloj estas verkitaj per plumoj el tiu sama ŝtalo, kiu konsistigas la kanonojn kaj la obusojn.

A. Fenner BROCKWAY:

Kiam viaj registaroj denove alvokos vin por militi, montru al ili,ke ilia povo militi estas forpasinta. La proletaro estas internaciigita per la komuneco de siaj zorgoj kaj mizero. Kiu obeus la mobiliz-ordonon,tiu ne defendus sian landon kaj sian klason , sed perfidus ilin. Al viaj ministroj,al viaj generaloj respondu: ne nur ni rifuzas preni la armilojn , sed ni rifuzas funkciigi viajn trajnojn, ekstrakti vian karbon,ŝarĝi viajn ŝipojn. Tiel la proletaro , anstataŭ detrui kaj mortigi,firme asertos sian solidaron kaj konstruos la patrion de l'popoloj, la tuthomaran patrion.

(En la kongreso de l'Militrifuzantoj,Liono,1931)

Runham BROWN:

Kiom da ŝtupoj devos grimpi la homaro antaŭ oi aboli la militon, tiel la ekonomian kiel la militan, tion

oni ne povas antaŭvidi. Sed la unuaj ŝtupoj estas la persona rifuzo, kaj poste la amasa rifuzo partopreni ĉian militon.

Pearl BUCK:

La soldatoj detruas, konsumas kaj nenion produktas.

Dom Helder CAMARA:

Paco realiĝos nur kiam regos justeco...
Sen malamo, sen perforto kaj sen timo, sed energie ni akuzu la maljustecon kiel la grandan baraĵon por la paco. Maljusteco estas la fonto kaj kaŭzo de ĉiu perforto.

Alberto CAMUS:

Kiuj ne volas mortigi, tiuj parolu kaj diru nur ion sed diru ĝin senĉese, kiel atestanto, kiel mil atestantoj, kiuj ekripozos nur kiam la murdo estos mondskale, definitive forpuŝita.

CICERONO:

Estas du manieroj solvi disputon: per diskutado aŭ per perforto. La unua konvenas al homoj, la dua propras al bestoj.

CIVILAJ VIKTIMOJ DE L'LASTAJ MILITOJ:

| | |
|---|---|
| 1914-1918 | 5 % |
| 1939-1945 | 45 % |
| Korea | 65 % |
| Vjetnama | 80 % |

Feliciano CHALLAYE:

La homoj, kiuj rifuzas mortigi kaj prepari sin mortigi, ŝajnas al mi la anoncantoj de l'novaj tempoj, la profetoj de la estonta, frateca homaro.

CLEMENCEAU:

La socia rolo atribuita al la soldato estas la absoluta servuteco... La profesiaj militistoj ne estas devigataj rezoni. Ilia metio eĉ faras krimon el la

praktikado de tiu natura kapablo.

Ludoviko COHEN:

Lernante uzi armilojn,oni sin preparas mortigi, tio estas fari krimon.

CONTENT:

Tiom longe dum la homoj ne obeos sian liberan volon, kaj lasos sin delogi far ajnaj mastroj aŭ estroj,ne utilos iluziiĝi,ĉiam eblos la militoj, kaj sekve la prokonscienca militrifuzado ĉiam estos nur la afero de kleraj individuoj senantaŭjuĝaj.Tio estas do afero pri edukado.

D-ro Ludoviko CORMAN:

Necesas diri "NE" al la milito. Necesas rifuzi ĉiun kunlaboron al faro,kiu estas krimo kontraŭ la homaro. Tion faris Georgo Fox, Vilhelmo Penn, Gandhi, tion faris la Kvakeroj,ĉiuj prokonsciencaj militrifuzantoj.

Joaquín Costa:

Patrion oni devas defendi kun libro enmane.

Karel ĈAPEK (1929):

Milito estas milito kaj se vi donus al aprino oran kolumon, ŝi estus komandanto.

Eŭgeno DABIT:

Nia homa digno estas rifuzi; nia devo ribeli.

Emilo DE GIRARDIN:

Por kio utilas la armeoj? Ili servas por krei la militriskon kaj por ĝin subteni. Sen ili ĝi ne ekzistus.

Barthélémy DE LIGT:

Ju pli da perforto, des malpli da revolucio.

Rolando DE MARES:

Junulo, kiu eniras kazernon, rapide fariĝas brutulo kaj malkuraĝulo. Brutulo , ĉar li agas senpripense, malkuraĝulo,ĉar li obeas. Kiu akceptas iun aŭtoritaton, kiel ajn manifestiĝas tiu aŭtoritato, tiu foroferas sian individuecon; nu, nepersoneca homo ne estas homo,ĝi estas nur malestiminda aĵo je la servo de l'potenculoj kaj de l'ruzuloj. La nura homa leĝo, la plej grava rajto de ĉiu estulo, estas agi laŭ sia animo kaj laŭ sia konscienco kaj ribeli kontraŭ ĉiu malbona influo.

DIDEROT:

Esti memvole mortigita pruvas nenion, escepte de tio, ke oni ne estas la pli forta.

DOSTOJEVSKI:

Mi vere ne komprenas,kial estas pli glore superŝuti sieĝatan urbon per pafaĵoj,ol murdi iun per hakilo.

Petro DOYEN, profesoro:

Ĉiu pacifista movado,kiu oficialiĝas, estas perdita por la Pac-afero.

Georgo DUHAMEL:

Mi ne plu estas en aĝo, kiam oni esperas reformi la mondon, sed mi volas reformi min mem , repuŝi miajn krudajn kaj simplajn impulsojn,racie bazi mian malaprobon al milito, al ĉiu milito, sen distingo, sen piaj sofismoj... Mi rifuzas al ĉiu milito, en ĉiu cirkonstanco, mian aprobon kaj mian kunlaboron.

Alberto EINSTEIN:

La liberigita potenco de la atomo ĉion ŝanĝis , nur ne la pensmanieron. Tiel ni iras al katastrofo nekonata ĝis nun. Novan pensmanieron ni bezonas , se la homaro restu viva.

...

Alberto EINSTEIN:

En kazo de milito,mi rifuzus ĉiun militservon,rektan aŭ nerektan , kaj mi strebus persvadi miajn amikojn agi same,sen kalkuli pri la rajtoj aŭ la kulpoj en la origino de l'konflikto.

...

Mi profunde malestimas tiun,kiu povas plezure marŝi en vico malantaŭ muziko: nur pro eraro li ricevis cerbon, spino tute sufiĉus al li.

...

La deviga militservo ŝajnas al mi la plej hontinda simptomo de manko de homa digno,pro kiu hodiaŭ suferas nia civilizita homaro.

...

Nenion faru kontraŭ via konscienco , eĉ se la Ŝtato postulas tion de vi.

...

Estas pli facile varbi la popolojn al pacismo,ol al socialismo.Hodiaŭ,la sociaj kaj ekonomiaj problemoj estas multe pli malfacilaj, sed necesas ke la homoj iom fidu al pacaj solvoj. Oni povas esperi, ke tiam ili ektraktos la politikajn kaj ekonomiajn problemojn kun kunagema spirito. Mi opinias, ke ni devus unue lukti ne por socialismo, sed por pacismo.

...

Mi estas konvinkita, ke savo povas veni nur el la sino de l'popoloj. Se ili volas eviti la malindan sklavecon de l'militservo,ili devas deklari sin favore al totala malarmiĝo. Ĉar tiom longe kiom estos armeoj, ĉiu iom grava konflikto povos konduki al milito. Pacismo, kiu ne batalas aktive kontraŭ la armilaroj de l'ŝtatoj,estas kaj restas senpova.

Generalo EISENHOWER:

Milito estas afero, dum kiu milionoj da homoj ,kiuj ne konas sin, sin mortigas ordone de malmultaj,kiuj tre bone sin konas,sed ne mortigas sin unu la alian.

...

Ĉiu kanono, kiun ni konstruas, ĉiu militŝipo,ĉiu ra-

keto finfine estas nenio ol priŝtelo al tiuj , kiuj malsatas kaj ne povas esti nutrataj, al tiuj , kiuj frostas kaj ne povas esti vestataj. Tiu ĉi "mondo en armiloj" malŝparas la ŝviton de laboristoj,la esplor rezultojn de sciencistoj kaj malesperigas iliajn infanojn.

Franko EMMANUEL, sekretario de l'Kartelo Internacia por la Paco en 1949:

Aktuale, kiam oni tiom parolas pri Paco,kiam la popoloj tiel sopiras ĝin, estas bone memorigi tiun ĉi simplan aksiomon: "La plej bona rimedo por lukti kon traŭ milito, estas ne partopreni ĝin". Kaj ankaŭ ne prepari ĝin, kaj fine organizi kontraŭ ĝi la kunordigitan rifuzon de la popolamasoj.

F.- K. ENDRES:

Ekzistas nur unu rimedon por humanigi la militon,tio estas ĉesigi ĝin.

J.H. FABRE:

La milito : la arto mortigi grandskale kaj fari kun gloro tion, kio etskale kondukas al la pendumilo.

Sebastiano FAURE:

La militrifuzado, kiun mi konsideras kiel nediskuteble revolucia kaj anarkisma, estas tiu, kiun la rifuzanto formulas proksimume jene: "Mi konvinkiĝis,ke milito estas frenezaĵo kaj krimo ; frenezaĵo de la popoloj kiuj konsentas ĝin fari;krimo de la registaroj kiuj preparas ĝin; kaj mi ne volas fariĝi komplico de krimo.

Kamilo FLAMMARION:

Alvenos la tago,kiam ne plu estos armeoj nek militoj, kiam la homo sentos sin hontega vidante, ke li laboras nur por nutri regimentojn, kaj kiam Francio, Eŭropo, la tuta mondo, liberigitaj,libere spiros , skuante kaj ĵetante al la sterko tiun mantelon el lepro,stulto kaj malnoblo,kiu nomiĝas militbuĝeto.

La popoloj permesas al sia estraro disponi ilin, kvazaù brutaron,konduki ilin al buĉado,redukti ilin en hekatombojn, sen pensi ke la vivo de ĉiu individuo estas ties persona propraĵo.

Anatolo FRANCE:

La civila milito estas malpli abomeninda ol la intergenta. Kial oni batalas,almenaù tion oni scias.

...

Oni kredas morti por la patrio, oni ja mortas por industriistoj.

FREDERIKO LA DUA:

Se miaj soldatoj ekpensus, neniu el ili restus en la vicoj.

GANDHI:

Mi ne hezitas aserti , ke la doktrino de neperforto valoras ankaù en la kadro de interŝtataj rilatoj.

...

Se, kiel devas esti , (krom se oni akceptus kuri al memmortigo) oni volas,ke en Eùropo komenciĝu procezo de ĝenerala malarmado,necesas unue,ke unu nacio kuraĝe ekiniciatu malarmi sin mem kaj akceptu elporti el tio ĉiujn riskojn. Se okazus tiu feliĉa evento,tiu nacio atingus tiom altan gradon de neperforto, ke ĝi estus universale respektata. Ĝiaj juĝoj estus senhezitaj. Ĝiaj decidoj,sen apelacio. Granda estus ĝia kapablo sin foroferi heroe kaj ties vivvolon profitus tiel la aliaj nacioj kiel ĝi mem.

...

Io certas. Se tiu freneza vetarmado pludaùrus , ne povus esti alia elirejo ol masakro sen precedento en la Historio. Se el tio eliĝus venkinta nacio , ties venko mem ebligus al ĝi ĉeesti la propran morton. La nura rimedo por forsavi sin for de tiu Damokla glavo estas kuraĝe kaj senrezerve akcepti la neperfortan metodon kun ĉio glora, kion tio entenas.

...

Se monavido ne ekzistus , estus neniu preteksto por sin armi. La principo mem de neperforto postulas,ke oni rezignu ĉiun formon de ekspluatado.
Tuj kiam tiu ekspluatemo ne plu ekzistos , la ŝarĝo, kiun pezigas sur niaj ŝultroj la pezo de ĉiuj ĉi armiloj, aspektos al ni aparte neelportebla. Ne povas esti vera malarmado tiel longe dum la diversaj nacioj de l'terglobo plue ekspluatas unuj la aliajn.

C.V. GHEORGHIU:

Entrepreno por subigi la mondon, jen kio estas milito.

Johano GIONO, franca verkisto:

Estas nur unu maniero deziri la Pacon:tio estas rifuzi ĉiujn militojn.

Petro GIRARD, profesoro:

Se la homoj estus informitaj pri la realaj motivoj de milito , kiuj ĉiam resumiĝas en trudado de perforta kaj subprema ordo profite al kelkiuj, en ekspluatado de l'amaso fare de malplimulto,estas evidente , ke ili rifuzus la militon.

J. GIRAUDOUX (La Troja milito ne okazos):

Tuj kiam proklamita estas la milito,nebrideblaj fariĝas la poetoj. La rimo,jen la plej bona tamburo.

Helmut GOLLWITZER:

Kiu rilate revolucion argumentas pacifiste, sed ne rilate la armeon, tiu malkaŝas sian argumentadon kiel ideologion de la reganta klaso.

Johano GUEHENNO (Notlibretoj de maljuna verkisto):

La militoj ĉiam finiĝas nur per falsaj venkoj , kaj la vera kaŭzo de nia hodiaŭa angoro ĝuste estas, ke nenie en la mondo la homoj sentas sin "liberigitaj". La riĉaj popoloj hontas pro sia feliĉo, la malriĉaj pro sia malfeliĉo.

Gustav HEINEMANN:

La milito ne estas naturleĝo, sed rezulto de homa agado. Pro tio necesas esplori tiun agadon.

...

Nia unuaranga devo estas, servi al la paco. Ne la milito estas la reala bazo, en kiu la homo montru sin taŭga, kiel oni instruis al mia generacio en la lernejoj dum la imperiestra tempo. Hodiaŭ la paco estas la reala kazo, dum kiu ni pruvu nian taŭgecon.

Robert A. HEINLEIN:

Demokratio estas malbona sistemo;la sola afero dir達ebla favore al ĝi estas, ke ĝi estas okfoje pli bona ol iu alia metodo.

Jan R. HERMANNS:

La profitintereso de tiuj, kiuj posedas la potencon kaj ne volas cedi siajn privilegiojn, ĉar ili kredas normala la disdividon de la homoj en riĉulojn k malriĉulojn, en subpremantojn kaj subprematojn , ĝi estas la esenca kaŭzo de ĉiuj konfliktoj.

...

Tiom longe, kiom la eklezio en ambaŭ flankoj de la fronto la soldatojn alvokas konsideri kiel pacservon, reciproke mortigi sin - kompreneble en la kazo de defendo, kiun ĉiu flanko por si pretendas - pli bone ĝi ne juĝu pri la perfortemaj revoluciuloj.

...

La eklezio silentas. Ĝi silentas kontraŭ la kristanaj soldatoj en Vjetnamio, same kiel ĝi silentis kontraŭ la soldatoj de la iama naziista Germanio. La sango de la senkulpaj militviktimoj plu fluas en multe pli forta grado ol la sango de la viktimoj de la revolucio.

...

La perforto de la regantoj flanke de la eklezio estas konsiderata pli afable ol la perforto de la revoluciuloj. Al ili oni rekomendas pacifismon ĉe la defendo de la interesoj kontraŭ la subpremantoj.Sed,

se la regantoj vokas al defendo de sia lando, subite la eklezio memoras pri la instruo de la kristana rezistrajto. La kontraŭdiro estas same okulfrapa kiel fatala.

...

Pri apliko de perforto fare de regantoj oni ne nur parolu tie, kie la kritikantoj de la potenculoj estas ĵetataj en malliberejojn. Apliko de perforto ankaŭ tie okazas, kie homoj devas malsati, ĉar ili ne ricevas sian parton el la riĉaĵoj de la lando - pro la politiko de la regantoj...
La apliko de perforto dum manifestacioj, kiu kaŭzas la difekton de propraĵo de la kontraŭulo , kompare estas nur sensignifa.

...

Ĉio, kion oni povas diri pri pravigo de perforto, ne povas forigi la fakton, ke apliko de perforto ĉiam estas esprimo de homa preterlaso.

Hermann HESSE:

Milito ne venas el blua ĉielo, ĝi devas esti preparata, kiel ĉiu alia entrepreno, ĝi bezonas la flegon kaj la kunlaboron de multaj por esti realigata. Dezirata, preparata kaj sugestata ĝi estas de homoj kaj potencoj, al kiuj ĝi donas avantaĝon. Aŭ ĝi al ili alportas rektan mongajnon kiel al la armadindustrio, aŭ ĝi donas gajnon de valoro, estimo kaj potenco al ĝis tiam senokupaj generaloj kaj koloneloj.

...

Minacantoj de nia mondo kaj de ĉiu paco estas tiuj, kiuj la militon deziras kaj preparas kaj provas nin fari kunlaborantoj per necertaj promesoj pri venonta paco kaj per timigo de atakoj el ekstere.

...

En la tuta mondo ĉiu politikisto tre pledas por revolucio, por racio kaj detruo de la armiloj - sed nur ĉe la malamiko, ne ĉe si mem.

...

Laŭ mia opinio du mensmalsanoj respondecas pri la hodiaŭa stato de la homaro: la manio de la tekniko

kaj la manio de la naciismo. Ili respegulas la hodiaŭan mondon; ili donacis al ni du mondmilitojn kun iliaj sekvoj kaj certe donacos similajn sekvojn. La rezisto kontraŭ tiuj du mondmalsanoj hodiaŭ estas la plej grava tasko kaj la pravigo de la menso sur nia tero.

...

Kiu spirite laboras, tiu ĉiam havas kiel kontraŭulojn la hura-patriotojn kaj la mouj-patriotojn, kaj ofte ili ambaŭ manifestiĝas en unu sama persono.

...

Oni ridas pri la rifuzantoj de la militservo. Laŭ mia opinio ili estas la plej valora simptomo de nia tempo, se ankaŭ la unuopa kelkfoje citas strangajn kialojn por sia ago... Eble iam venos la tempo, kiam al tri junuloj, kiuj decidas iĝi soldatoj, kontraŭe staras dek junuloj, kiuj decidas fari anstataŭan civilservon. Tiam oni lasas tute nature la militmetion al la denaskaj batemuloj kaj netaŭguloj. Sed neniam tio estus veninta, se neniam grupo da homoj estus havintaj la kuraĝon kontraŭi la kutimon de la amaso kaj rifuzi la militservon.

Viktoro HUGO:

Nu, vi volas la devigan militservon. Kontraŭ kiu ? Kontraŭ aliaj homoj? Sed la militservon mi ne volas. Mi volas la Pacon.

...

Ĉiuj militoj havas pretekstojn , sed ĉiam havas nur unu kaŭzon: la armeon. Forigu l'armeon kaj vi forigos la militon.

...

Kio fariĝus la Ŝtato, se neniu konsentus servi ĝin?

Karl JASPERS:

La demando de la paco unuarange ne estas demando al la mondo, sed de ĉiu al si mem.

...

Johano JAURES:

La homaro estas malbenita se, por pruvi sian kuraĝon, ĝi estas kondamnita mortigi eterne.

Stanislaw Jerzy:

Io estas putra en la ŝtato Danio. Ho, kiom grandega estas Danio!

...

Oni ne povas ludi la "Kanton de Libereco" per la instrumento de la perforto.

Papo JOHANO XXIII:

Kiel pravigan kaŭzon de la militara armado oni indikas, ke en la nunaj cirkonstancoj paco ekzisti povas nur per la ekvilibro de la armiloj. La pliigo de la armado ĉe unu flanko sekvigas streĉojn ĉe la alia flanko. Pro tio la popoloj troviĝas en daŭra timo kiel antaŭ ŝtormego, kiu ĉiumomente kun granda forto povas ekesti. Kaj tio ne okazas sen kaŭzo, ĉar armiloj ja vere ne mankas.

Roberto JOSPIN:

La militrifuzanto estas tiu, kiu,antaŭ la senutileco de la hieraŭa milito kaj la terura amplekso de la morgaŭa, komprenas kaj asertas,ke la pasintecaj nocioj pri "justa milito", "nacia defendo", "savota civilizo", perdis ĉiun signifon. Ke la milito , kun ties nekredebla disvolvado de scienco kaj potenco,ruinigus ĝis la valorojn mem, kiujn ĝi pretendas savi.

JOUBERT:

La sono de l'tamburo forigas la pensojn; ĝuste tial tiu instrumento estas esence militista.

Mathias JUNG:

Apartenas al la kontraŭdiroj de la nuna kapitalismo, ke la kreo de fajrorezista fritpato estas realigita per raketprogramo, kiu kostas miliardojn. Eble baldaŭ oni postulos la konstruon de militŝipoj, por povi produkti akvorezistan bakpulvoron.

Immanuel KANT: Paco ne estas ideo, sed tasko.

John F. KENNEDY:

La homaro devas fari finon al la milito, alie la milito faros finon al la homaro.

...

Hodiaŭ ĉiu homo devas scii, ke iutage la tero povos esti ne plu loĝebla. Ĉiu viro,ĉiu virino,ĉiu infano vivas sub la Damokla glavo, kiu troviĝas je silka fadeno, kiu ĉiumomente povas esti tratranĉita per hazardo, malĝusta kalkulo aŭ frenezo. La armiloj de la milito devas esti detruataj, antaŭ ol ili detruos nin.... La riskoj, kiuj troviĝas en la malarmado estas etaj kompare al la riskoj, kiuj troviĝas en senlima vetarmado.

Martin Luther KING:

La plej granda manko de la perforto estas,ke ĝi produktas ĝuste tion, kion ĝi volas neniigi. Anstataŭ malpliigi la malbonon, ĝi pliigas ĝin.

...

Sen-perforto ne signifas rezigni ĉiun agadon.

...

Kiu silentas pri la malbonaĵo - se ankaŭ nur pasivetiu estas same kulpa,kiel tiu,kiu kunhelpas fari ĝin. Kiu sen kontraŭdiro akceptas la malbonaĵon ,envere laboras kune kun ĝi.

Hans KUIJSTEN:

Enregimentigo, armeigo,milito estas la ŝtupoj de la abdiko de l'inteligento antaŭ la realaj malfaciloj.

Gerardo de LACAZE DUTHIERS:

La demokratoj fieras, ĉar ili konservas konstantajn armeojn kaj faris el la deviga militservo novan idolon; vere tio ne indas fieron; kia progreso! La reĝoj ne tiom postulus.

...

Kio estas tiu revolucio , kiu konservas armeon kaj kiu,pretekstante protekti la liberon,ekforigas ĝin?

Pär LAGERKVIST:

Ĉiuj homoj verdire volas militon. Ĝi alportas simpligon,kiun ili sentas kiel plifaciligon.

...

Por kio alia ja estas soldatoj ol por tio, ke ili estu uzataj?

...

Mi sentas,ke la mondo freneziĝis! Daŭra paco! Neniaj militoj! Kia senenhavo de la parolo, kia infaneco! Ĉu ili opinias ebla,ke ili scipovas ŝanĝi la mond-ordon mem? Kia vanteco? Kaj kia perfido kontraŭ la pasinteco kaj la gloraj tradicioj! Jam neniam milito! Ĉu ne plu okazos sangelverŝado, kaj gloro kaj honoro ne plu signifos ion?

LAO-TSE:

La armiloj estas iloj de malfeliĉigo kaj neniam iloj por nobla homo,kiu uzos ilin nur kiam li estos nepre devigita...

...

Malamon kompensu per amo!

...

Kie estis milito,tie kreskas dornoj, kaj sen rikolto estas la jaro.

...

Eĉ en la venko ne estas belo
kaj kiu nomas ĝin bela
apartenas al tiuj, kiuj trovas ĝojon en la masakro;
kaj kiu en la masakro trovas ĝojon,
tiu ne sukcesos en sia ambicio mondregi.
Funebraj lamentoj devus akompani la gorĝtranĉitajn popolamasojn, kaj la venkon oni devus celebri per funebraj ritoj.

Petro LARIVIERE:

La militrifuzantoj savas tion, kio eble restis pura kaj bela en nia homaro koruptita de dudek jarcentoj

da besteca ĝuado. Ili estas la nura honesta rezisto kontraŭ la vento de frenezo,kiu puŝas la tutan homan specion al memmortigo,ili estas la savo de ĉiu espero. Non serviam.

LA ROCHEFOUCAULD:

La kvereloj ne daŭrus longe,se la kulpo troviĝus nur unuflanke.

Ernesto LAVISSE:

Terura sorĉa cirklo estas tiu ĉi : la ŝtatoj havas armeojn por sin defendi kontraŭ la militoj; ili havas la militojn, ĉar ili havas armeojn.

Halldór Kiljan LAXNESS:

Se oni volas fari krimon,oni devas fari ĝin en kongruo kun la leĝo, ĉar ĉiuj grandaj krimoj estas farataj en kongruo kun la leĝo.

Paŭlo LEAUTAUD:

La geedzeco kreas kokritojn kaj la patriotismo stultulojn. (Tempopasigilo)

...

La milito estas la laŭleĝa reiro al sovaĝeco.

...

La socio,kiu bezonas obeemajn kaj relative honestajn individuojn, dum pactempo tenas la homojn sub reto de leĝoj,kiuj igas ilin proksimume virtaj.
Alvenas la milito: ĝi plilarĝigas la maŝojn de tiu reto kaj lasas la homojn al ties plej aĉaj kaj plej kruelaj instinktoj,kiujn, denove pro socia bezono,ĝi nomas heroeco. Unuvorte,kio dum pactempo estas delikto kaj krimo, tio fariĝas ago de kuraĝego kaj de patriotismo. (5 dec. 1915)

...

Por la paco estas ĉiuj popoloj, sed neniu registaro.

...

La deviga militservo estas la honto de la nunaj socioj.

Ludoviko LECOIN:

Eĉ se oni pruvus al mi,ke per milito mia idealo havus ŝancojn realiĝi, mi tamen rifuzus la militon . Ĉar oni ne konstruas homecan socion sur amasoj da kadavroj.

El la Leksikono por teologio kaj eklezio, eld. 1960:

Obeemo estas la subigo de la volo en la devigan volon de la aŭtoritato...
La obeanto do respektas la ordonantan volon kaj per tio jesas ĝian enhavon. Li ne akceptas tiun enhavon ĉar ĝi estas bona, sed ĉar ĝi estas ordonita.En tio troviĝas la logiko de la obeemo, kiu kaŭzas ĝian moralecon. Obeemo al la aŭtoritato donas tion, kio al ĝi estas ŝuldata, nome la sekvadon. Se el tio iĝas daŭra preteco, sendemande efektivigi la ordonitan , tiam ni havas la virton de obeemo.

Duko de LEVIS (Maksimoj kaj pripensoj):

Se oni deprenus de la patriotismo ĉe la homamaso la malamon kaj malestimon al aliaj nacioj, restus malmulto.

Profesoro Mario LUBECKI (Varsovio):

La milito , kiu estas la kolektiva organizado de l' murdo, devas renkonti la plej energian reziston fare de la homoj, kiaj ajn estas iliaj filozofiaj aŭ politikaj opinioj.

LUKANO (Farsalo):

En civila milito, eĉ la venko estas malvenko.

Petro MAC-ORLAN: (

Maĉo inter sepdek-kilograma viro kaj sampeza obuso estas nediskuteble unu el la plej stultaj niaepokaj inventaĵoj.

(Manlibreto de la perfekta aventuristo)

Viktoro MARGUERITTE:

La vera, la sola rimedo por akceli,en ordo, la re-

volucian evoluon kaj samtempe mortigi la militon, estas la rifuzo prepari kaj fari ĉi-lastan. En la laboratorioj, la uzinoj, la kazernoj, internacia striko de l'krucitaj brakoj.

Christopher MARLOWE:

Rajto faras lokon tie, kie armiloj volas.

Robert Mc. NAMARA:

Hodiaŭ ni ne bezonas vetkuradon de armado, sed vetkuradon de racio.

...

Ekzistas inter ni preskaŭ ne forigebla tendenco, nome, vidi niajn sekurecproblemojn nur el la militista vidpunkto.

Guy de MAUPASSANT:

Kion ili faris?
Kion ili do faris por la bonfarto de l'homaro, la reprezentantoj de la milito? Nenion!!!
Kion ili inventis? Kanonojn kaj pafilojn!!!
Tio estas ĉio!
Ĉu la elpensinto de la puŝveturilo, kiu ligis radon kun du traboj, ne faris pli valoran por la homaro ol la eltrovinto de la plej moderna fortikaĵo.

Alexander MITSCHERLICH:

Nur psikologie neklara kapo povas formuli, ke "Milito estas daŭrigo de la politiko per aliaj rimedoj". Milito tute kontraŭe koincidas kun parta malfunkcio de la konscienco, ĉar ĝi intencas kaj permesas la mortigon de samspecanoj.

Maria MONTESSORI:

La vera defendo de la popoloj ne povas esti la verko de armiloj. Militoj sekvas unu la alian kaj la venko neniam certigas la pacon aŭ la bonfarton de ĉiu -- ĝi neniam sukcesos tion fari, se ni ne uzos la edukadon kiel la grandan "armadon por la paco".

NAPOLEON:

En la mondo estas nur du potencoj: la glavo kaj la spirito. Finfine, la glavon ĉiam venkas la spirito.

NIETZSCHE:

Homo, kiu soldatiĝas, ne plu estas homo, sed nur soldato.

Rajmondo OFFNER:

Eĉ se temas pri socialistoj aŭ komunistoj , ekde la minuto kiam la homoj eniras en kazernon, ili nenion plu povas fari,ili estas perditaj, ili estas bestoj por la buĉado.Sekve,tiu rimedo estas senefika.Necesas do unue ne eniri.

Paŭlo OPPERMAN: Rilate al la pent-sakramento:

La juĝo pri la neceso kaj justeco de milito estas afero de konscienco de ŝtatestroj. Objektive en unu flanko la milito ĉiam estas maljusta. Subjektive ambaŭ flankoj povas kredi ĝin justa.
Tie, kie ekzistas la ĝenerala deviga soldatiĝo, ĉiu subulo devas fari sian devon, ankaŭ se - pro la kulpo de la regantoj - okazas maljusta milito.

PASCAL:

Kial vi mortigos min? Nu,ĉu vi ne loĝas trans la akvo? Mia amiko,se vi loĝus sur tiu ĉi flanko,mi estus murdanto , estus maljuste tiel mortigi vin; sed ĉar vi loĝas aliflanke,mi estas bravulo,kaj tio justas.

Boris PASTERNAK:

Tio, kion ni hodiaŭ faras, decidas pri la aspekto de la morgaŭa mondo.

Georgo PICHT:

Interne ĉiu ŝtato baziĝas sur jura ordo. Tial estas malpermesite, en la interno solvi politikajn konfliktojn per armiloj. Sed ekstere la suverena ŝtato ĝenerale havas la rajton en sia intereso uzi armilojn . Pro tio ekzistas militara potenco. Ĝi ekzistas , ĉar

la suverena ŝtato en siaj internaciaj rilatoj malagnoskas pli superan instancon, kiu decidu laste pri milito aŭ paco. Okazas militoj, ĉar ni vivas en internacia ordo, kiu al la ŝtatoj permesas ekstere uzi tiun armilpotencon, kiun ili - pro bona kaŭzo - malpermesas interne.

...

La milito ne estas la ununura formo de apliko de brutala perforto. Ekzistas ankaŭ la subtila formo de perforto per kapitalismaj, feŭdaj aŭ socialismaj regsistemoj. Ĝi postulas ne malpli da homvivoj ol la grandaj buĉadoj kaj popolmurdoj de ĉi tiu jarcento kaj provokas la intercivitanan militon.
Pro tio tiu milito ne plu estas venkebla per armiloj, sed nur per pozitivaj fortoj de la paco.
Oni devas krei internacian juran ordon, kiu malebligu ankaŭ tiun subtilan perforton kaj kiu permesu solvi la centrajn mondproblemojn.

PROVERBOJ (El "Proverbaro Esperanta" de Zamenhof):

Du militas - tria profitas.
Konsento konstruas, malpaco detruas.
Pli valoras paco malbona, ol malpaco plej bona.

E. RENAN (Filozofiaj dialogoj kaj fragmentoj):

La tiel nomata Dio de la Armeoj staras ĉiam flanke de la nacio, kiu posedas la plej bonan artilerion, la plej bonajn generalojn.

Andreo RIBAUD:

Anstataŭ sendi al la malriĉuloj ion por ne malsatmorti, la riĉuloj liveras armilojn por ebligi al ili - se ankoraŭ necese - morti ankoraŭ pli rapide.

RIVAROL (Politika nacia ĵurnalo):

La malfideliĝo de la armeo ne estas unu el la kaŭzoj de la revolucio: la revolucio mem ĝi estas.

...

Romano ROLLAND:

Rifuzi sian konsenton kaj sian kunlaboron al la krima ŝtato estas la plej heroa ago,kiun povas plenumi homo de nia tempo. De li, individuo sola kontraŭ la kolosa Ŝtato , kiu povas senemocie strangoli inter kvar muroj - de li ĝi postulas energion kaj oferemon nekompareble pli grandajn ol por alfronti la morton, miksante sian spiron kaj sian agonian ŝviton kun tiuj de la grego...

...

La popoloj trudu la pacon anstataŭ atendi ĝin el la registaroj, kiuj trompas kaj plue trompos ilin ĝis la popola volo energie manifestiĝos.

Julo ROMAINS:

...la plej ordinara sagaco montras al ni, ke la uzado de perforto, se praktikata kiel antaŭe en la formo de konflikto inter grandaj ŝtatpotencoj , de nun egalvalorus kolektivan memmortigon.

Johano ROSTAND:

Oni mortigas unu homon: oni estas murdanto. Oni mortigas milionojn: oni estas konkeranto. Oni mortigas ilin ĉiujn: oni estas dio.

...

...klopodi por fordetrui ĉiujn atomarmilojn,klopodi por ekstermi la aparatojn , kiuj celas ekstermi la homon, jen estas la unua devo de ĉiu bona "mondcivitano", la sana obsedo de ĉiu rezonkapabla membro de la homara familio.

...

Tiu homo, kiu indignigas cin, aŭ li naskiĝis el alia raso ol ci, aŭ li estas perdita frato cia: ambaŭkaze ĉu li ne indas cian kompaton? (1939)

Bertrando RUSSELL:

Eĉ ne unu el la malbonoj, kiujn oni volus eviti per milito, estas malbono tiom granda kiom la milito mem.

Han RYNER:

Tro da homoj kontentiĝas,ne volante la militon. Sed ni la pacon volas.

...

Jes,ni ĉiuj,kun aŭ sen uniformoj, deziras la pacon, ni konsistigas la armeon de l'paco. Nu, la militrifuzantoj estas la avangardo de tiu armeo. Eble, vi opinias,ke tiu avangardo marŝas iom rapide;sed pensas ni, ke estas la ariergardo,registaro kaj leĝistoj, kiu estas iom malrapidema kaj postrestema.

Marko SANGNIER:

Por mortigi la militon,necesas unue mortigi la malamon en la koroj.

J.P. SARTRE:

Kiam la riĉuloj intermilitas, estas la malriĉuloj, kiuj mortas.

Grafo de SEGUR:

Paco estas la revo de l'saĝuloj, milito estas la homara historio.

G.B. SHAW:

La soldata metio estas la arto de l'senkuraĝulo; la arto ataki senkompate,kiam oni estas forta kaj sin teni for de l'danĝero, kiam oni estas malforta. Jen la tuta sekreto por la venko.

...

Vi estas brava. Jes. Tio estas formo de stulteco.

SHELLEY:

Nenio donas al la ŝtato la rajton mortigi homojn kaj servutigi ilin por la murdado . La uniformo ne estas ekskuzo; ĝi nur aldonas al la murdo la malnoblon de la servuteco.

Mulford SIBLEY:

Ĉiu perforto tendencas iĝi 'reakcia',kiuj ajn estas

la celoj de la uzantoj. Kvankam oni eble povas iagrade kontraŭstari fine la konsekvencojn de uzado de perforto, tiu ĉi tamen ĉiam postlasas siajn cikatrojn; se realiĝas progresado al egaleca socio, tio estas ĉefe spite al uzado de perforto, kaj ne dank'al ĝi.

A. de SAINT-EXUPERY:

La malo de perforto ne estas malforto, sed forto.

THAYER GEORGE:

La armilo estas la patrino de la milito.

Johano TEHO:

Ci ne mortigu! Se bone komprenita, tiu regulo - memorigita de Kristo - estas la forigo de l'ekzekutistoj, de l'generaloj, de l'krimuloj kaj de l'militoj.

U. THANT (Pri la vjetnama milito, 26.2.1968):

Fakte, sento de angoro kaj naŭzo kaptas la mondon antaŭ la intenseco kaj la sovaĝeco de l'milito. Korŝire estas ĉeesti la agonion de senkulpaj civiluloj kiuj neniel povas scii pri kio temas... Egalas la abomenecon de l'milito nur ties senutilo. Ne povas esti venko nek malvenko. Nur pliigitaj suferoj, ĉiam pli multnombraj mortoj kaj detruoj...

Leono TOLSTOJ:

Vi volas fari el mi komplicon de murdo. Vi postulas de mi monon por fabriki armilojn kaj vi volas, ke mi lokiĝu en murdistajn bandojn? Nu, mi aplikas la leĝon, kiun vi mem agnoskas, kaj kiu delonge malpermesas ne nur la murdon sed ĉiun malamikecon; tial mi ne povas obei vin.

...

Cia konscienco povas esti nur en ci, kaj ne ĉe la kaporalo aŭ ĉe alia estro. Neniu povas decidi por ci, kion ci povu, devu aŭ ne devu fari. La homo ĉiam respondecas pri tio, kion li faras... La veraj kristanoj devas rifuzi submetiĝi al la militservo.

Johano TOULAT:

La ĉiudirektan defendon ni devas anstataŭigi per la ĉiudirekta paco kaj la paralizon de l'timo per la vigleco de l'amo. Timo naskas malfidon, malamon, militon. Amo liberigas de timo, renversas la montojn da antaŭjuĝoj, konsideras ĉiun homon kiel fraton. Amo estas radioaktiva: ĝi liberigas latentajn energiojn en la koro de l'homo, naskante ĉen-reagojn, kiuj forbalaas ĉiujn malfidojn. Atombombon aŭ karitaton, ni devas elekti: For la kanonojn, la tankojn, la raketojn, la napalmon! Lokon por la lernejoj, la rikoltmaŝinoj, la hospitaloj, la soci-kulturaj ekipaĵoj! La homoj soifas fratecon. Ili sentas sin samplanedanoj. Se ili militstrikas, tio estas por esti packonstruantoj.

Abato Johano UDE:

Nun ĉiu milito, defensiva aŭ ofensiva, estas maljusta; ĉio apartenanta al la militismo estas krimeca.

Paŭlo VALERY:

Milito estas operacio, per kiu interbuĉas homoj, kiuj ne konas unuj la aliajn, je l'profito de aliuloj, kiuj interkonas sed ne interbuĉas.

...

La politiko estas la arto malhelpi la homojn zorgi pri kio koncernas ilin. (Tia, kia)

Emilo VERAN:

Necesas forigi la armeojn, antaŭ ol ili havos la tempon murdi la popolojn.

Paŭlo VIALAR:

La milito estas ne la faro de kiuj volas ĝin, sed de kiuj ĝin akceptas.

Alfredo de VIGNY:

La ekzisto de la soldato estas - post la mortpuno - la plej dolora, barbareca postsigno, kiu restas inter ni.

Arturo VILLARD , svisa deputito, 1968:

Ĉies malamiko, tio estas la militismo. Mi estis inter tiuj, kiuj , naive,longtempe kredis, ke, kiam sufiĉe granda nombro da ŝtatoj estus transirintaj al socialisma organizformo,tiam eblus eviti la militon - almenaŭ en la influsfero de socialismo. Delonge mi devis elreviĝi. Definitive. Militismo estas danĝera kancero. La freŝdataj eventoj nur pruvis,plian fojon, ke nepras konsideri ĝin la malamiko de ĉiuj popoloj kaj kiom pravas tiuj,kiuj volas ataki la malbonon ĉe la radiko kaj rifuzi obeon por la armita servo al tutpotenca ŝtato,ĉu kapitalisma, ĉu socialisma...

Oskaro WILDE:

Laŭ iu ajn, kiu studis historion, la malobeemo estas la ĉefa virto de l'homo. Ĉar estas dank'al la malobeo, ke realiĝis la progreso, dank'al la malobeo kaj la ribelo.

...

Tiel longe kiel la milito estos rigardata kiel malbonfara, ĝi konservos sian fascinan povon. Kiam oni rigardos ĝin triviala, ĉesos ĝia populareco.

(Intencoj )

C.F. v.WEIZSACKER:

Oni devas plani la pacon, kiel oni pli frue planis la militon.

...

Aŭ ni vivos en monda paco, aŭ ni ĉesos vivi.

Georgo YVETOT, iama sekretario de la franca sindikato C.G.T:

Nu, kamaradoj, via racio devas malpermesi al vi mortigi aliajn homojn, viajn samulojn. Vi rifuzos obei,se oni volos fari el vi murdistojn. Via laborista konscienco malpermesas al vi pafi al aliaj laboristoj.

El antaŭparolo en broŝuro de UNESKO:

Ĉar militoj komenciĝas en la pensado de la homoj,oni devas influi tiun pensadon en paca direkto.

Vatikanumo, Eklezio kaj mondo, 79:

Kiu kiel soldato servas al la patrio, tiu konsideru sin servanto de sekureco kaj libereco de la popoloj. Plenumante ĉi tiun taskon brave, li vere kontribuas al la firmigo de la paco. (!?!)

Sur la kapo... (Nekonato)

Unu el la bazaj mensogoj de nia erao estas:
Oni devas produkti armilojn por eviti militojn. Tute male: Oni bezonas militojn por ne eviti la armilproduktadon.
Pro tio, do por certigi la armilproduktadon, estas produktataj ankaŭ militoj. Ili estas produktrimedoj.

Poemo de soldato en Vjetnamio:

Mi havas demandon: Kiu pelis nin,
murdi unu la alian?
Kiu aŭskultas, estu mia atestanto:
Mi ne povas akcepti tiun ĉi militon,
mi neniam povis, mi neniam povos.
Milfoje mi devas diri tion,
antaŭ ol mi estos mortigita.

Mi estas kiel la birdo, kiu vokas sian kunulon,
la sango gutas el ĝia rompita beko kaj ĝi krias:
Atentu, turnu vin kaj ekkonu viajn verajn malamikojn:
Ambicio, perforto, malamo kaj avido.

La homo neniam povas esti via malamiko,
ankaŭ ne tiu, kiun oni nomas Vjetkong,
restos neniu frato, se ni murdas la homojn.
Kun kiu ni poste vivu?

--==o==--